

Kondolencaj vortoj pri la forpaso de Irina

Kara sinjoro Hori!

Hodiaŭ mi sciigas al vi malgajan novaĵon.

La 14-an de aprilo post longa malsando en Jekaterinburgo (Rusio) en la aĝo de 53 jaroj forpasis sinjorino Irina KIRINA (09.10.1965 – 14.04.2018). Dum kelkaj jaroj ŝi persiste luktis kontraŭ la kruela malsano kaj ĝis la lasta tago ne perdis la esperon. Ŝia luktista nomo estas DIREKTORO.

Helan memoron!



Sur la foto: partoprenantoj de la Esperanto-sumoo el Urala regiono dum la Zamenhof-festo la 17-an de decembro 2016 en Jekaterinburgo. Irina sidas meze sub la portreto de la Majstro.

Vladimir Opletajev (Vlostano), Surguto

Karaj sumooistoj,

S-ino Irina KIRINA (09.10.1965 – 14.04.2018), sumoo-nomo Direktoro, forpasis. Ŝi ekpartoprenis en nia sumoo en la 42a Sumoo (septembro 2016) kaj estis prizorganto, sed en la marta sumoo ŝi neniam respondis. Mi demandadis min, ĉu ŝi estas malsana au vojaĝas. Mi estis tre maltrankvila pro ŝia silento, kaj fine kiel vi legos supre, venis malĝoja informo pri ŝi. Mi dankas al ŝi pro ŝia kontribuo al la sumoo. Ni preĝu por ŝia paca dormo en la paradizo.

HORI Jasuo

La ondo de Esperanto

La 14an de aprilo post longa malsano en Jekaterinburgo forpasis Irina Ljvovna Kirina (1965–2018), konata Urala Esperanto-aktivulino. Nekrologo aperis en La Balta Ondo:

<http://sezonoj.ru/2018/04/nekrologo-36/>

La Balta Ondo

La 14an de aprilo post longa malsano en Jekaterinburgo forpasis
Irina Ljvovna Kirina (1965-2018)



Irina Kirina, fakulino pri ekonomiko kaj sociologio, laboris en Ŝtata Nafta-Gasa Universitato (Tjumeno), kie ŝi antaŭe diplomiĝis pri ekonomiko, kaj dum la lastaj jaroj estis docento en la Ruslanda Ŝtata Profesia-Pedagogia Universitato (Jekaterinburgo); scienckandidato pri sociologio (2006), aŭtoro de kelkaj sciencaj kaj didaktikaj verkoj.

En 1980 Irina eklernis Esperanton en kurso de Aleksander Korĵenkov en Tjumeno, kaj sekvajare partoprenis en la okcidenta kaj orienta SEJToj kaj baldaŭ iĝis unu el la plej aktivaj partoprenantoj de Uralaj kaj Siberiaj esperantistaj renkontiĝoj, kaj aktivulino kaj estraranino de la Tjumena Esperanto-klubo “Revo”, kadre de kiu ŝi (kun)organizis plurajn esperantistajn aranĝojn.

Kiel amatora ĵurnalisto, Irina verkis plurajn artikolojn pri Esperanto por loka gazetaro, kaj kontribuis per artikoloj en Esperanto al “Ekzakte”, “Ruslanda Esperantisto”, “La Ondo de Esperanto” kaj al aliaj Esperanto-

gazetoj. En la fino de la 1990aj jaroj ŝi estis sekretario de la Ruslanda sekcio (la plej granda sekcio) de la ĵurnalista asocio TEĴA.

Dum la du lastaj jaroj Irina grave malsanis, kaj mortis je la Zamenhofa mortotago, la 14an de aprilo kaj entombigita la 18an de aprilo en la tombejo de Sredneuraljsk (apud Jekaterinburgo).

Ni kondolencas al ŝia filino Anna, al ĉiuj familianoj kaj samideanoj de nia kara amikino kaj kunlaborantino Irina Kirina.

Ripozu en paco!

Halina
Aleksander Korĵenkov

Gorecka

Vortoj de sumoo-istoj

1. La sumoo-a ĉielo denove malbrilas stelon. Post forpasoj de s-ro Thu (Rambutano) el Vjetnamio kaj s-ino Saĉiko Iŝtok el Kanado, nun ni devas adiaŭi al Irina Kirina (Directoro). En la 50-a Sumoo ŝi estis mia prizorgantino. Mi ĉiam memoras kaj bedaŭras al ŝi.

Sincere kaj profunde mi kondolencas al ŝia funebra familio kaj preĝas por ŝi pacan dormon en paradizo.

Jadluong58 Luong Ngoc Bao el Vjetnamio

2. Pacon kaj helecon al ŝia animo! Elena Popova

3. Sincerajn kondolencojn al ŝia familio. Amike, Edith el Francio.

4. Dankon pro la informo. Mi ne persone konis ŝin, sed mi tre bedaŭras ekscii pri tiel frua morto. Kore, Anna el Britujo

5. Al s-ino Irina KIRINA mi preĝu por ŝia paca dormo en paradizo. 🙏

YU Jianchao, Pekina Esperanto-Asocio

6. Mi estas tre malfeliĉa por la malbela novaĵo pri IRINA (ŝi estis mia prizorgantino dum la Julia Sumoo en 2017). Mi preĝos por ŝi ! KARLA

7. Bonvolu kondolenci sian familion kaj geamikon, mi petas.

amike, Monneret

8. Nun s-ino Irina estas libera de ĉiuj siaj ĉagrenoj. Ĉu vi scias, mi pensas, ke eble en paradizo estas aparta loko por esperantistoj, kaj tie ĉi feliĉa iamaniere partoprenos kun ni de Maja Sumoo.

Kore, Kelli.

9. Mi deziras, ke ŝia animo restu pace en la paradizo. Ŝi estis ankaŭ mia zorgantino. Mi bedaŭras! Kun malĝojo, PRADIP

10. Ho ve! Kia bedaŭro... Sxi estis unu el mia kontrolistoj... Tre afabla homo... Dio ricevu ŝian animon. Kore, Fonto.

11. Kun tristeco mi sendas al sinjorino Irina KIRINA kaj ŝia familianoj, amikoj, kolegoj ... mia kondolenco, preĝu al ŝi restu trankvile kaj pace sur la ĉielo. Amike, Alta

12. Direktoro ekzemplas kiel luktisto!

"Falar uma lingua estrangeira e romper uma fronteira. Falar muitas e romper varias. Falar o Esperanto e querer romper todas de uma vez". (Affonso Romano de Sant'Anna)



"Paroli fremdan lingvon estas rompi landlimon. Paroli multajn estas rompi plurajn. Paroli Esperanton estas voli rompi samtempe ĉiujn". (Affonso Romano de Sant'Anna).

Luiz A. de O. Coelho

13. La malsano postulas nek aĝon, nek niajn maltrankvilecojn, krom nia deziro vivi, kaj kondukas nin al malproksimaj ĉieloĵoj por forgesi niajn malfeliĉojn. Eble Irina ripozu en paco. Barbara Romyca (Romika)

14. Mi tre malĝojas de la forpaso de s-ino Irina Kirina. Mi el Nepalo sendas sinceran kondolencon al la grupo kaj familianoj. Bharat

15. Koran kondolencon pro ĉi tiu tro juna viktimo de tiu malsano kiu estas tro multfaceta por ke ni liberighu. Irina ja signifas "Paco". Ŝi memorigu nin pri nia tasko! Kore, Rob.

16. Sendube Irina estis la zorganto de mia sumoo legado, mi elkore dankis ŝian zorgon kaj preĝas sian dormon. Sanpei Keiko

17. Mi ege bedaŭras! Ŝi estis dum kelkaj monatoj mia prizorganto! Dio benu kaj protektu ŝian spiriton! Fratece, Graca

18. Mi tre bedaŭras forpason de s-ino Irina Kirina, mi preĝas pri ŝi. Amike, Jitka

19. Mi malĝojiĝis kiam mi legis pri la morto de s-rino Irina Kirina. Mi preĝos por ŝi kaj ŝiaj familianoj, parencoj kaj amikoj. oOo JONEL

20. Mi tre bedaŭras aŭdi pri la forpaso de s-ino Irina KIRINA. Mi esperas, ke ŝia animo restos en celo. Kun sinserajn salutojn, Mukunda Pathik